

HODIAŬ PLENUMIĜIS TIU SKRIBO – Komentario al la Evangelio de p.Alberto Maggi OSM

Lk. 1,1-4; 4,14-21

Ĉar multaj jam entreprenis aranĝi historion pri la faktoj, kiuj estas konstatitaj inter ni, kiel ilin transdonis al ni tiuj, kiuj de la komenco vidis mem kaj estis administrantoj de la vorto, ŝajnis bone ankaŭ al mi, esplorinta ĉion atente de la komenco, skribi en ordo al vi, plej eminenta Teofilo, por ke vi povu scii la certecon pri la aferoj, pri kiuj vi estas instruita.

En tiu tempo revenis Jesuo en la potenco de la Spirito en Galileon; kaj eliris famo pri li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. Kaj li instruadis en iliaj sinagogoj, glorate de ĉiuj. Kaj li venis al Nazaret, kie li estis edukita; kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, kaj stariĝis, por legi. Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja. Kaj, malfermite la libron, li trovis la lokon, kie estis skribite:

La spirito de la Eternulo estas sur mi; Ĉar Li min sanktoleis, por bonanonci al malriĉuloj; Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj kaj vidpovon al blinduloj. Por meti la vunditojn en liberecon, kaj por proklami favorjaron de la Eternulo.

Kaj kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis; kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis. Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo kiun vi aŭdis plenumiĝas.

En la Evangelio laŭ Sankta Luko, Jesuo eniras kvarfoje en sinagogon kaj ĉiufoje li troviĝas en grava malakorda situacio. La unuan fojon, tiun kiun la liturgio prezentas al ni hodiaŭ, oni klopodas Lin mortigi.

Ni vidu la kialon. La liturgio prezentas al ni la komencon de la Evangelio laŭ Sankta Luko ĉar la evangeliisto intencas diligente priskribi la eventojn kiujn aliuloj jam rakontis, poste, pro tiuj strangaj artikoloj de la liturgiistoj, oni tuj eksaltas al la 4a ĉapitro.

“Revenis Jesuo en la potenco de la Spirito en Galileon” kaj post la tentado en la dezerto, “kaj eliris famo pri li tra la tuta ĉirkaŭaĵo. Kaj li instruadis en iliaj sinagogoj”. Jen la evangeliisto komencas distancigi sin; la sinagogoj estas iliaj. La kristana komunumo disiĝis de tiu hebrea kaj, do, ekzistas tiu diferenco, ili estas iliaj sinagogoj.

“Glorate de ĉiu”, Li estis glorata, sed en Nazareto, ŝajne ne okazis la sama afero. “Li venis al Nazareto”- Nazareto estis vilaĝeto da trogloditoj, tio estas, homoj kiuj ankoraŭ vivis en kavernoj, ĝi estis sovaĝa vilaĝeto konata kiel kovejo de ŝovinistoj, nome de homoj ligitaj al religiaj idealaĵoj pri supereco de Izraelo kaj pri perforto kontraŭ la romiaj regantoj – “kaj laŭ sia kutimo li eniris en la sinagogon en la sabata tago, “Tiu estas la unua el la kvar fojoj kiam Jesuo eniras en la sinagogon en la Evangelio laŭ Sankta Luko, kaj ĉiufoje Li estos okazo je malakordo, “kaj li stariĝis, por legi.”

“Kaj estis donita al li libro de la profeto Jesaja”. Kaj la liturgiaj legaĵoj en la sinagogo sekvis trijaran ciklon, tial ĉiusabate estis bone antaŭvidita, bone fiksita la farenda legaĵo. Sed, jen Jesuo kiu faras la unuan malobeon. Jesuo ne legas la antaŭviditan tekston por la tiutaga legaĵo, anstataŭe oni diras ke “malfermite la libron, li trovis” Tiu “trovi” estas rezulto de “serĉi”, la greka verbo uzata de la evangeliisto estas εὕρισκω, de kie devenas la fama vorto eureka..

Eureka kio estas tio? Mi trovis ĉar mi serĉis. Do Jesuo serĉas ne la tagan legaĵon, sed ion malsaman. Kaj li serĉas la pecon de la profeto Jesaja ĉe la 61a ĉapitro, kie troviĝas la starigo de la Mesio. “La spirito de la Sinjoro, la Eternulo, estas sur mi, ĉar la Eternulo min sanktoleis”, la sanktoleadon en la hebrea lingvo oni nomas mashiah, de kie devenas la vorto Mesio, kiu tradukita en la malnovgreka lingvo estas Kristo, kiu signifas la sanktoleita.

Kio estas la sanktoleita? La sanktoleita estas tiu homo plenigita per la forto kaj povo de Dio kiu faras lin dia homo, li estas reprezentanto de Dio kaj de ties forto.”Kaj li min sendis por bonanonci al malriĉuloj”. La bonanco, kiun la malriĉuloj atendas, kia ĝi povas esti? Ĝi povas esti la fino de ilia malriĉeco. “Li sendis min, por anonci liberecon al kaptitoj kaj vidpovon al blinduloj”.

Ĉi tie ne temas tiom pri redono de vidpovo al blinduloj; la malliberejoj troviĝis ĉiuj subgrunde kaj la malliberuloj, la enkarcerigitaj homoj estis tute en la mallumo, do redoni la vidpovon al blinduloj signifas liberigi la subprematojn, kiel daŭrigas la skribaĵo: “Por meti la vunditojn en liberecon, kaj por proklami favorjaron de la Eternulo”.

Jen kial tiu estas la bona novaĵo por la malriĉuloj, la favorjaro de la Eternulo estas la jubileo, kiam, laŭ la priskribo de la Libro de Levidoj, en la lando okazas la liberigo por ĉiuj loĝantoj. Do Jesuo priparolas tiun favorjaron de la Eternulo por la liberigo de ĉiuj homoj, sed, strange... la versego daŭriĝis per ... “por anonci venĝotagon de nia Dio”.

Kaj, male, Jesuo tion ne legas. Jesuo ne konsentas kun la profeto Jesaja. Li konsentas proklami favorjaron de la Eternulo, nome la signo de libero, sed li ne konsentas kun la venĝo al regantoj. Do la versego daŭriĝis per “la venĝotago de nia Dio” kaj Jesuo, kontraŭe ĝin cenzuras, Jesuo ĝin ne legas.

Tiam Jesuo jam malobeis unu fojon, li serĉis tekston kiu ne estis tiu liturgia, nun li eĉ denove malobeas: li preterlasas la duan parton de tiu ĉi versego. Poste “kunvolvinte la libron, kaj redoninte ĝin al la subulo, li sidiĝis”. La “sidiĝo” estas la pozo de la majstro, ĝi estas la pozo de la instruisto, nu, la etoso estas plena je streĉiteco – bedaŭrinde la liturgio tranĉas tiun epizodon laŭ du sinsekvaj dimanĉoj, senigante ĝin je la tuta patoso kaj emociiga efiko - “Kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis”.

Estas granda streĉiteco, pro tiuj du malobeoj, sed antaŭ ĉio pro la fakto ke Jesuo ne priparolis la venĝon, kiu estas tio kion atendis la Nazaretanoj kiel ekscititaj ŝovinistoj. “Kaj li ekparolis al ili: Hodiaŭ tiu skribo kiun vi aŭdis plenumiĝas”. Kaj tie mi ne komprenas kial en la traduko la tradukisto eliminis gravan elementon : “per viaj oreloj”.

La evangeliisto volas apudmeti la okulojn en la sinagogo (kaj la okuloj de ĉiuj en la sinagogo atente lin rigardis) al la oreloj. Kial li tion volas? Ĉar tiu estas evidenta aludo al profeto Jeĥezkel, ĉe la 12a ĉapitro, 2a versego, kie la profeto skribas: “Ho filo de homo! meze de domo malobeema vi loĝas; ili havas okulojn, por vidi, sed ili ne vidas; ili havas orelojn, por aŭdi, sed ili ne aŭdas; ĉar ili estas domo malobeema”. Do, tiuj okuloj kiuj fikse rigardas Jesuon ne vere vidas kiu li estas, kaj la oreloj kiuj aŭdas lian mesaĝon ne komprenas ĉar ili estas malobeema rasaĉo.

Kaj tie finiĝas la liturgia versio kiu poste daŭrigos, ni tion vidos per la venontdimanĉa komentario, kiam la tutaj sinagoganoj sin turnos kontraŭ Jesuo kaj decidos mortigi lin. La unuan fojon kiam li eniris en sinagoton.